**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 13

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Ĉe tablo malplena babilo ne ␣ **l** ␣ ␣ ␣.

**2.** Sur ĉeval' de najbaro la ŝarĝo ne ␣ ␣ **z** ␣ ␣.

**3.** Kapo malsaĝa ne ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **ĝ** ␣ ␣ nek kalviĝas.

**4.** Vivu stomako laŭ stato de l' ␣ ␣ **k** ␣.

**5.** La antikvaj Egiptanoj havis genian saĝon kaj **k** ␣ **e** ␣ ␣ civilizacion.

**6.** La ĉefaj stratoj en Teboj estis larĝaj, **r** ␣ **k** ␣ ␣ ␣ kaj pavimitaj per ŝtonaj platoj; la bordoj de Nilo formis bulvardojn, la domoj estis kvar- kaj kvinetaĝaj.

**7.** La altranguloj malalte ␣ **l** ␣ ␣ ␣ **ĝ** ␣ ␣ kaj Ramzes pasis en siajn ĉambrojn.

8.Ruĝaj sabloj de la okcidenta dezerto brilis ĝis la limoj de horizonto, de kie iafoje blovis la ␣ **p** ␣ **r** ␣ de varmega vento, kvazaŭ el forno.

**9.** Reinhold Messner opinias, ke la ␣ ␣ ␣ **c** ␣ de l' vivo alte en la montaro ne estas multe pli diferenca ol ĉie aliloke en la mondo.

**10.** Onklino Grazia prezentos vin al panjo, penu ␣ ␣ ␣ **ĉ** ␣ al ŝi, sed ne arlekenu, estu serioza.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Estas konata delonge la **e** ␣ ␣ ␣ **s** ␣ ␣ de la tiel nomata antimaterio, konsistanta el antipartikloj.

**2.** La instanco responsa pri urba planado **f** ␣ ␣ **s** ␣ ␣ zonojn ekzemple por industrio, agrikulturo, loĝado aŭ por parkumado.

**3.** La oldulino estis malgranda, pura, kun apogbastono, ŝia pala kaj **f** ␣ ␣ **v** ␣ vizaĝo fiksiĝinta al la ostoj, la lipoj senkoloraj – kiel mumio.

**4.** Pro via sano estus bone vivi iom en kamparo kaj spiri **f** ␣ ␣ **ŝ** ␣ ␣ aeron.

**5.** Tion dirante, la juna knabino donis al la virino malgrandan **r** ␣ **l** ␣ ␣ da monpaperetoj.

**6.** Kuŝante sur sakoj kaj **p** ␣ **k** ␣ ␣ en krakanta veturilo, la vizaĝo turnita al la tero, la malfeliĉa Eunana komencis per ĝemanta voĉo kanti.

**7.** Komence oni kolektis ĉefe unuopajn poŝtmarkojn, poste ankaŭ **k** ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ ␣ ␣ kun poŝtmarkoj.

**8.** La cikonia patrino kuŝis sur la **o** ␣ ␣ ␣ kaj estis tute certa, ke ŝi feliĉe elkovos.

**9.** Aliflanke la eteco de boato estigas riskon en **l** ␣ **g** ␣, kiu kutime sovaĝiĝas tre rapide.

**10.** Zamenhof retroderivis ***k*** ␣ ␣ ␣ de *kuzino* (france cousine) kaj *fraŭlo* de *fraŭlino* (germane Fräulein).

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| prunt', intenc', paĝ', dors', mastr, region', ŝovel', serĉ', adres', klas'. |
|---|

**1.** Konato komputilista diris, ke la virusoj devenas *de miaj amikoj*, kiuj certe senscie ricevis virusojn, kiuj uzis iliajn komputilajn ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣.

**2.** Scott Weiss "enkuris" la Guinness-libron pri rekordoj, kiam li ␣ ␣ **r** ␣ ␣ **r** ␣ ␣ portis sian amikon tra distanco de unu mejlo en iom malpli ol 12 minutoj.

**3.** Loĝado en 6-lita ĉambro kostos 30 eŭrojn por la tuta periodo – kaj estas granda elekto de loĝeblecoj (do ankaŭ prezoj), konsultebla en la ␣ ␣ **ĝ** ␣ **r** ␣ de IJK.

**4.** Mi elkore kredas, ke sub la nomo de gramatikinstruado niaj gramatikinstruistoj ␣ ␣ **n** ␣ ␣ ␣ ␣ **n** ␣ ␣ detruas la esencon de Esperanto.

**5.** Oni jam kapablas ␣ **l** ␣ ␣ ␣ **g** ␣ ĉiujn elementojn de niaj genoj.

**6.** Laŭ Aristotelo ␣ **r** ␣ ␣ ␣ ␣ **d** ␣ de mono kontraŭ interezo estas perversa maniero akiri havaĵon.

**7.** Balotoj baziĝas sur ␣ ␣ **g** ␣ ␣ ␣ ␣ **s** ␣ ␣ kaj ne sur realigeblaj programoj; administrantoj estas enpostenigitaj laŭ politika koloro, kaj ne laŭ kapabloj.

**8.** La landoj por la senŝuldiga programo devas pruvi la kapablon singardeme ␣ ␣ **s** ␣ ␣ ␣ **m** ␣ per la subvencioj.

**9.** Persone, mi uzas la rapidan ␣ ␣ **r** ␣ ␣ **l** ␣ ␣ *Google* por trovi senkostajn tiparojn.

**10.** Ĉiam li opiniis sin realisto, homo, kiu stabile staras sur la tero, tamen nun io forte igis lin preni fosilon kaj ␣ ␣**v**␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ kaj komenci fosi sub la olda saliko.

## **Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Tia estis la batalo, kiu bolis en la ___ de l' princo: jen li pensis, ke li ĉion komprenas, jen ree ĉirkaŭis lin mallumo.

**a.** fonto **b.** animo **c.** glacio **d.** korbo

**2.** En ĉi tiu momento la ĉefpastro Mefres prenis en la manon grandan ___ kaj ĉerpis el la kaldrono bolantan peĉon.

**a.** kuleron **b.** koverton **c.** horloĝon **d.** langon

**3.** Tiu ___ estus dividenda inter la ministrejoj pri internaj aferoj, pri defendo kaj pri financo.

**a.** spirito **b.** religio **c.** limo **d.** sumo

**4.** Malavantaĝo estas, ke presiloj havas nur normajn paperformatojn, do ankaŭ deklinia notico foruzas ___ A4.

**a.** voĉon **b.** stelon **c.** folion **d.** merkredon

**5.** La Tutmonda Nutriga Programo de UN celas ne nur nutri la infanojn, sed ankaŭ ___ ilin.

**a.** juĝi **b.** estimi **c.** eduki **d.** atingi

**6.** Pijus, ekde sia infanaĝo, ĉiudimanĉe partoprenadis ___ meson kaj longan tempon servadis por la pastro dum ĝi.

**a.** sanktan **b.** kulpan **c.** saĝan **d.** vastan

**7.** En Egipto plej ofte la faraono faris al la dioj ___ oferojn kaj konstruis templojn.

**a.** malmolajn **b.** mallertajn **c.** malavarajn **d.** malfreŝajn

**8.** Tutmozis, la plej fama elegantulo en Memfiso, eĉ dum la milita marŝado zorgis pri sia ___ kaj surverŝis sin per parfumoj.

**a.** ŝafo **b.** leĝo **c.** voĉo **d.** tualeto

**9.** La alkemiistoj sensukcese strebis al la produktado de ___ el malmultekostaj materialoj.

**a.** ŝafo **b.** ombro **c.** oro **d.** pako

**10.** Esceptokaze ĉi tiun ___ ni sendas ankaŭ al tiuj el la pasintjaraj abonintoj, kiuj ankoraŭ ne renovigis la abonon.

**a.** kajeron **b.** genuon **c.** insekton **d.** mastron